

JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2023-2024

Table des matières

Enkonduko	2
1. Konsciigo (Informado)	3
1.1 Gazetara Komunikado	3
1.2 Le Monde de l'Espéranto	3
1.3 Esperanto-Aktiv'	3
Rubrikoj	4
Redaktora teamo	4
Listo de artikoloj	4
1.4. Foiroj	5
2. Kapabligo	6
2.1. Kulturcentroj	6
Kvinpetalo (Bouresse)	6
Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)	6
Propraj staĝoj	6
Aliaj okazaĵoj	6
2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)	6
2.3. Interretaj kursoj	7
2.4. KER-ekzamenoj	7
2.5. Komisiono Espéranto à l'école	8
2.6. Afrika agado	8
2.7. Ĝemelaj urboj	9
2.8. Komisio eldono	9
3. Komunumo	10
3.1. Butiko	10
3.2. Sidejo	11
3.3. Landa kongreso	12
3.4. Preleg-turneoj	14
4. Kunordigado kaj funkciado	15
4.1. Rilatoj kun UEA	15
4.2. Komitato kaj membraro	15
Jaro 2024–2025	15
4.3. Financoj	16
5. Jarraportoj de la regionaj asocioj	17
5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)	17
5.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)	17
5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest	18
5.4. Fédération Espéranto-Limousin	18
5.5. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)	19
5.6. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)	19
5.7. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)	22
5.8. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)	24
5.9. Fédération Espérantoccitanie	26
6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj	27
6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)	27
6.2. ILEI-Francio	27
6.3. TAKE (Tutmonda Asocio de konstruistoj esperantistaj)	27

Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Esperanto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta dimanĉon la 8an de junio de la 10a ĝis la 12a, aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org.

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto :
Emmanuelle Richard, Raymonde Coquisard, Pierre Gauthier, Laure Patas d'Illiers, Bert Schumann, Renée Triolle, Axel Rousseau, Katalin Kovats, Alexandre André, Maurice Juy, Guy Camy, Liba Gabalda, Saïd Baluĉi, Régis Fabre, Pierrette Formen, Jean-Pierre Bertrand, Didier Janot, Pierre Grollemund, Jean-Luc Thibias, Pascal Vilain, Marion Quenut, Gilles Tabard, Xavier Godivier, Marcelle Provost

Agrablan legadon deziras al vi,

La estraro de Esperanto-France.

1. Konsciigo (Informado)

1.1 Gazetara Komunikado

1.2 Le Monde de l'Espéranto

- Redakta teamo: Bruno Flochon, Emmanuelle Richard, Gilles Tabard. Grafika laboro : Emmanuelle Richard
- Regule kunlaboras al la aktualaĵoj en la franca aŭ/kaj al la kulturaj paĝoj: Raymonde Coquisart, Lida Gabalda, Mireille Grosjean, Anne Jausions, Didier Loison, François Lo Jacomo, Edmond Ludwig, Flo Martorell, Gilles Tabard, Renée Triolle, la partoprenantoj de diversaj gravaj staĝoj k.a., kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.
- La tekstojn kontrollegas Claude Jausions, Gilles Tabard kaj Pascal Villain.
- Danke al laboro de Claude Bensimon, *Le Monde de l'Espéranto* estas nun enretigata en la retejon de Espéranto-France: <https://esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperanto>
- En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, laŭeble dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.
- Aperis 2 numeroj en 2023/2024
 - numero 611: Les archives de l'espéranto (Mai 2023)
 - numero 612 : Les archives de l'espéranto (suite) (Février 2024)

Raportis Emmanuelle Richard

1.3 Esperanto-Aktiv'

La reta informletero Esperanto-Aktiv', verkita en la franca lingvo, celas aperi ĉiumonate. Espéranto-France dissendas ĝin, de 2010, al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO).

- Pli ol 3000 personoj ricevas la leteron retmesaĝe. Ekde 2022, la letero ne plu estas sendita perpoŝte.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn en <https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni laŭ la sama retejo.
- Bonvolu sendi viajn ideojn, sugestojn, artikolojn, anoncojn pri eventoj al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org

Rubrikoj

- **Découvertes** ("Malkovroj") prezentas temojn rilate al la esperanta movado, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de diversaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.
- **Ils l'ont fait... dans leur région** ("Okazis") listigas la ĵusajn agadojn de la lokaj kluboj; tiun rubrikon prizorgas Raymonde Cocquisart kaj Dominique Lacambre.
 - Post ĉiu evento, bonvolu sendi fotojn kaj artikoleon priskribante la okazaĵojn, la etoson, vian sperton.
- **Calendrier** ("Okazos") vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio, en Eŭropo kaj ankaŭ tra la cetero de la mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgis Dominique Lacambre.

- **Lu, vu, écouté ce mois-ci** (“Leginda, spektinda, aŭskultinda”) prezentas recenzon de ĉu libro, ĉu muzikalbumo, ĉu filmo, freŝe publikigita aŭ pli malnova; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.

Redaktora teamo

Raymonde Coquisart (redaktado de rubriko “Ils l’ont fait...”), Dominique Lacambre (kalendaro), Emmanuelle Richard (teknika spertulo; reteja mastrumado; reta dissendo), Axel Rousseau (kunordigado, redaktado).

Pluraj membroj de la redaktora skipo forlasis la postenon pro profesiaj aŭ familial kialoj do necesas havi novajn fortojn por daŭrigi la laboron.

Listo de artikoloj

La jaro 2024 vidis la aperon de nur kvar numeroj de Esperanto Aktiv.

Monato	N°	Malkovroj	Leginda, spektinda, aŭskultinda
07/2023	EU 140	Debora, organisatrice du congrès mondial de Turin	Deux recueils de nouvelles de Julian Modest : <i>Mara stelo</i> et <i>Fera birdo</i>
09/2023	EU 141	LSG, Ligo de Samseksemaj Geesperantistoj	<i>L’espéranto par la méthode directe</i> , de Stano Marček
10/2023	EU 142	Thierry Spanjaard et Pascal Vilain, réalisateurs de la chaîne YouTube EsKu	La malamiko de Putin (L’ennemi de Poutine), de Kalle Kniivilä
11/2023	EU 143	UEA Facila, avec Anna Löwenstein	<i>Inès en Okcitanio</i> , de Laure Patas d’Illiers
12/2023	EU 144	Quelques idées pour un club de lecture	Le Congrès des Villes-pont, de Hannes Larsson
01/2024	EU 145	Quelques concours littéraires en espéranto	La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj vojaĝoj
02-03/2024	EU 146	L’organisation du congrès européen d’espéranto	Elementaj principoj de milita propagando, d’Anne Morelli
04-05/2024	EU 147	Dunkerque Esperanto et son café-langue. Entretien avec Eddy Goubinat.	La libro de la mil kaj unu noktoj
06-07/2024	EU 148		Nova Planedo, d’Eliette Jafflin-Millet

Raportis Raymonde Coquisard (el Francilia Federacio)

1.4. Foiroj

Kiel kutime, Esperanto-Francilio partoprenis nome de Esperanto-Francio la foiron pri matematikaj ludoj, organizitan de Animath sur placo Saint Sulpice en Parizo de la 23a ĝis la 26a de majo 2024. Organizis FLJ AL Deĵoris Elisabeth Barbay (EB), FLJ, Lucien Bresler, Gérard, PG, Loïc Morvan, DL, Sarah, AL. La rezulto estas kontentiga. Estis sufiĉe da deĵorantoj, ni ne estu pli ol 3 samtempe. La evento plaĉis al la deĵorantoj: la publiko neniam malfavoris E-on kaj ĝenerale estis mense malfermata. Pli ol dek lerneaj grupoj antaŭmendis kaj ĉeestis po unu duonhoran prezenton de Esperanto, plejparte kun prizorgo de EB. Plejofte la lernejanoj sciis nenion pri Esperanto. Ni montris afiŝon pri Mundolingua kaj ili reciproke afiŝis pri ni, Mundolingua plu disponigos nian kalendaretojn.

La homaran festono (13-15/09), en Brétigny-sur-Orge. La budon pagis Esperanto-France. Organizis AL. Deĵoris AL, Guillaume, Lucien Bresler, Romain, Victor Simonnet, Laurent Vignaud... .

Salon de l'éducation (15-17/11), en Parc des expositions, Parizo. Esperanto-France pagis por la budo Organizis PG. Deĵoris PG, LPI, Lucien Bresler, Jérôme Auclair, Laurent Vignaud, Sarah, Romain, Elisabeth Barbay.

Tiuj ĉi sukcesaj spertoj instigas nin daŭrigi kaj eventuale ampleksigi nian partoprenon en foiroj, kaj se eble prepari sufiĉe longe antaŭe tiun ĉi partoprenon, ekzemple per preparo de specifa inform-materialo kaj de proponeblaj kursetoj.

Raportis Federacio Francilio

2. Kapabligo

2.1. Kulturcentroj

Kvinpetalo (Bouresse)

Ni ne ricevis raporton.

Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France plu estas komitatano de Greziljono ĝis 2024. Reprezentanto de Espéranto-France: Didier Loison. Jen raporto pri la civila jaro 2023.

Propraj staĝoj

- Entute: 62 tagoj, 1849 tranoktoj, 5421 preparitaj manĝoj, por 289 homoj el kiuj 67 nefrancoj kaj 10 infanoj.
- Printempa kursaro, ĥoro Interkant kaj BEMI biciklado en printempo.
- Naturisma semajno, Maratona kursaro kun IEK, staĝo *Échanges*, Infana semajno kun Someras en somero.
- Staĝo *Aŭtune* kaj ĥoro Interkant en aŭtuno.
- Laboroj kun volontuloj okazis dum 20 tagoj kaj aliaj semajnfinoj por ripari kaj ĝardenumi. Venu volontuli!

Aliaj okazaĵoj

- Luado al ne-esp-istaj grupoj por financi laborojn: 36 luoj dum 68 noktoj. E-istoj ĝuas rabaton!
- Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj amika etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongreson aŭ staĝojn.
- Laboroj: Daŭras la novigo de la kastela tegmento. La enira vojo estis renovigita

Raportis Bert Schumann

2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

FEI estas instanco komuna al SAT-Amikaro kaj Esperanto-France. Ĝi ĉefe organizas ekzamensesiojn kaj delegas al la regionoj zorgi pri la unua- kaj duagradaj ekzamenoj Atesto pri lernado kaj Atesto pri Supera Lernado. Ili ne konkurencas la KER-ekzamenojn ĉar ili kontrolas ne nur la lingvon sed ankaŭ sciojn pri la kulturo de la Esperanto-Movado. La belan diplomon, formato A4 vi afiŝos en via koridoro kaj ĉiuj vizitantoj faros al vi demandojn!

Dum la lernojaro 23-24, sesioj okazis dum la kongreso de Esperanto-France (po du kandidatoj) kaj kongreso de SAT-Amikaro (2 kandidatoj por la 1agrada). Okazis ankaŭ en Montigny la 3an de junio (2 kandidatoj ĉe la 1agrada), en Marseille, la 23an de junio (po 2 kandidatoj : unu venis el Clermont-Ferrand por trapasi la 2agradan), en Greziljono la 2an de novembro - 2 kandidatoj ĉe la 2a nivelo). Kiel vi konstatas, malmultaj regionoj kuraĝas puŝi siajn lernantojn kaj ne pretas organizi sesion. Tamen tute facile, avertu la Direktoron de Ekzamenoj, triolle.renee@wanadoo.fr (kiu sendos al vi la necesan materialon), sufiĉos fotokopii ĝin ; trovi

klasĉambron kaj 2 ĵurianojn. Ĉiujn informojn ĉe la [ttt.ejo](#) de FEI vi trovas.

Por la 3agrada, komuna trunko de la Kapableco, sesio okazos dum la aŭtuna semajno en Greziljono, fine de oktobro. Legendaj libroj estas "La bona Lingvo" de Clauĉde Piron , " Mondo de travivaĵoj " de Tibor Sekelj , " Ne ekzistas verdaj steloj" de Liven Dek kaj " Viktimoj" de Julio Baghy. Vi bedaŭrinde maltrafis la preparadon, kiu estis gvidata de Renée Triolle dum Mediteranea Esperanto-Semajno .

Alia tasko de FEI estus kontroli la aperontajn librojn aŭ gazetojn, sed bedaŭrinde ni konstatas gramatikajn erarojn nur post apero ! Ne hezitu vin turni al ni!

Raportis Renée Triolle

2.3. Interretaj kursoj

Espéranto-France mastrumas 4 interretajn kursojn: la programo Kurso de Esperanto, la Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons, Gerda Malaperis por progresantoj kaj Paŝo al Plena Posedo.

27 volontuloj (30 en 2022-2023) korektas tiujn kursojn.

Dum la 12 monatoj de oktobro 2023 ĝis septembro 2024, 628 lernantoj aliĝis (850 dum la antaŭa jaro) kaj 67 finlernis la elektitan kurson (57 dum la antaŭa jaro).

De 2022 jarojn, ni proponas 2 ekzamenojn laŭ la KER nivelo (A1 kaj A2).

La teamo verkis raporton por analizi la rapidecon de la lernado per la interretaj kursoj (vidu :

<https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-150-decouverte>)

Tiu raporto estis premiita de la Fondaĵo La Torre. La konkludo pruvas ke Esperanto estas averaĝe dekoble pli rapide lernebla ol alia lingvo.

Raportis Axel Rousseau

2.4. KER-ekzamenoj

Inter 2008 kaj 2024 entute estis 2824 sukcesaj ekzameniĝoj. La kandidatoj devenis el 83 landoj. Francio estas la plej sukcesa lando kun 613 sukcesoj. Kaj en 2023 kaj en 2024 denove Francio estis en la unua loko rilate la nombron de ekzameniĝintoj.

En tiuj du jaroj trapasis KER-ekzamenon 15+17 personoj, el inter ili 2+4, entute 6 kandidatoj sukcesis je C2-niveloj.

BARBOT	Thibault
VILHELM	François
PLANCHON	Philippe
DIEUMEGARD	Pierre
MANDIROLA	Michael Boris
LO JACOMO	François

La nomojn de ĉiuj aliaj kandidatoj vi povas vidi en la fierlisto: <https://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>
Ĉiuj komparaj statistikaĵoj legeblas en la paĝo:

<https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=kandidatoj>

Fragmentoj el ili estas sube.

La KER-Ekzamena Centro scivole atendas kiom da francaj kandidatoj aliĝos en 2025 al la ekzamenoj, precipe al ties C2-nivela sesio (okazonta papere kaj rete la 1an de aŭgusto, dum la kongreso en Brno, Ĉeĥio), ĉar en tiu ĉi jaro okazos ankaŭ konkurso kaj la plej sukcesaj ekzameniĝintoj el la plej sukcesaj 3 landoj estos publikigitaj.

La ekzameniĝinto kun la absoluta plej alta poento sume de ĉiuj niveloj ricevos la titolon: la plej bona reganto de Esperanto. (Sciu, ke jam ekzameniĝintoj povos reekzameniĝi por akiri la gloron al sia lando).

Legu ĉe <https://edukado.net/novajhoj?id=922>

Francio estas inter tiuj malmultaj landoj, kies landa asocio subtenas finance siajn ekzameniĝintojn. UEA esprimas siajn gratulojn kaj dankon por tio.

Raportis Katalin Kovats

2.5. Komisiono Espéranto à l'école

Kiel pravigite en nia lastjara raporto, tiucele nia komisiono ĉesis agi.

Tamen, kompreneble, ni daŭre respondis al ĉiu demando aŭ klarigpeto rilate al la metodo MLA, kaj ni ekis plibonigi ties uzadon kun la nepre necesa kunlaboro de Emmanuelle Richard.

Espereble ĝi estos preta por la venonta lernjaro.

Raportis Alexandre André, Maurice Juy, Guy Camy.

2.6. Afrika agado

En la pasintaj du jaroj ni helpis afrikan Esp-movadon per donaco de libroj entute je la valoro de €1344.

Plej parto de la libroj estis Esperanto-FR-lingvaj lernolibroj el la eldonaĵoj de Esperanto FR mem kaj ni sendis ĉefe al la franclingvaj afrikaj landoj...

En 2024 ni sendis librojn al Afriko laŭ la ĉi subaj datoj

22 avril	Facture F24-423	-483,64 €
11 mars	Facture F24-333	-115,49 €
11 mars	Facture F24- 332	-189,30 €

2.7. Ĝemelaj urboj

Daŭra problemo restas funkciigi veran komisionon pri ĝemelaj urboj. ... Regule kunvenis geesperantistoj el ĝemelaj urboj i.a. Parizo/Romo, kiu perfekte funkcias. Daŭre partoprenas multaj partoprenantoj el diversaj landoj.

Oftaj partoprenoj al retaj kunvenoj de Seŭlo tre interesaj ...

Regula ĝisdatigo de la paĝo Ĝemelaj urboj sur Fejsbuko kaj aperigo de informoj pri kunvenoj tra la mondo kaj pri kontaktoj kun Radio Havana kaj Pola Radio. Nuntempe estas 268 ŝatantoj kaj 277 kiuj regule sekvas la ĝisdatigojn de la paĝo. La nombro ne plialtiĝis depost la pasinta jarraporto ...

Planoj daŭre restas... Denove aperigi informojn sur la UEA Forumo, UEA facila kaj prepari artikolojn por la retejo de Espéranto France sen forgesi la reaperigon de la UEA Bulteno pri Ĝemelaj Urboj redaktita de la eks-delegito Wu Gojang el Ĉinio.

Raportis Raymonde Coquisart

2.8. Komisio eldono

En 2024, Esperanto-France eldonis 2 novajn librojn.

Februaro 2024: *Elementaj principoj de milita propagando*

Majo 2024: *La libro de la Mil kaj Unu noktoj*

En 2025, ĵus aperis *Tri rakontoj. Trois contes* (dulingva) de Gustave Flaubert.

La laste publikigitaj libroj bone vendiĝis, parte ĉar ni varbis pri ĝi. Indas ankoraŭ pli varbi pri niaj libroj, ne nur al francaj esperantistoj sed ankaŭ al la tutmonda esperantistaro. Por tio, helpantoj estos bonvenaj.

Raportis Emmanuelle Richard

3. Komunumo

3.1. Butiko

Reta butiko: butiko.esperanto-france.org

Plej bonaj vendoj dum la jaro 2024 (20 plej bonaj):

Eta Princo	105	1014,00
Templo del Suno	45	461,68
PIV 2020 Plena Ilustrita Vortaro	7	450,00
Romano pri la tri regnoj serio de 3 volumoj	2	300,00
Exposition en 12 panneaux	1	290,00
Grand dictionnaire français-espéranto (avec supplément)	19	210,50
Sekreta vivo de miaj najbaroj	11	198,00
Metodo 11 (édition 2020)	20	180,00
Grand dictionnaire Espéranto-français	18	180,00
Elementaj principoj de milita propagando	15	166,20
Inès en Okcitanio	21	159,75
Dictionnaire pratique édition 2014	9	146,00
Espéranto par la méthode directe	11	129,00
Poŝamiko	22	121,00
Sur bluaj planedoj (1)	9	117,00
espéranto c'est dans la poche	112	112,00
Lingua, politica, cultura. In honorem de Renato Corseti	2	82,60
Grammaire ABC d'espéranto	3	81,00
Stranga malapero	9	75,15
Ĉiuj Superherooj	7	73,20

(1) La libro *Sur Bluaj Planedoj* vendiĝas ankaŭ rekte ĉe lulu.com kaj aliaj retaj librovendejoj. En tiu ĉi tabelo, ni notis la sumon de la vendoj en nia butiko kaj en la butiko ĉe lulu.com kaj aliaj retaj butikoj. Ni konsideris la "normalan" eldonon kaj la libron en grandaj literoj kiel saman libron.

Raportis Saïd Baluĉi

3.2. Sidejo

La kolegoj en la sidejo de Espéranto-France sincere dankas vin pro via subteno dum la pasinta financjaro nome la komenco de Oktobro 2023 ĝis la fino de Septembro 2024!

La sidejo funkciis bone kaj glate kiel la pasintaj jaroj, grandparte pro fidela kunlaboro de la estraro kaj volontuloj.

Ni en la sidejo akceptis multajn homojn: Esperantistojn kaj ne Esperantistojn, enlandajn kaj eksterlandajn kies petojn ni traktis. Krome, ni ricevis kaj traktis ankoraŭ telefonalkvotojn, retmesaĝojn, paperajn korespondojn,

Esperanto-rilatajn kaj aliajn administrajn korespondojn kiujn ni dissendis al la koncernaj respondeculoj en la estraro, kasisto, informadiko kaj Esperanto-Paris, kies sidejo estas samloka kun tiu de Espéranto-France.

Se iom detale paroli, ni en la sidejo:

- Preparis kaj sendis 928 (pasintjare estis 566) fakturitajn mendojn al niaj membroj, klientoj kaj aktivuloj. Danke al la profesia kunlaboro de nia informadiko kaj retbutiko, nia libroservo nuntempe vendas regule eĉ al eksterlandaj klientoj. Nia libroservo nuntempe estas bone konata en Esperantujo.
 - Aĉetis kaj aranĝis 75 (pasintjare estis 51) fakturitajn libro-aĉetojn de UEA, Sat-amikaro, Mondial, Kava Pech kaj aliaj.
 - Dissendis nian paperan organon LME (Le Monde de l'Espéranto) al niaj membroj kaj E-aktivuloj.
 - Dissendis la aliĝilon (bulletin d'adhésion 2023-2024), eĉ papere por memorigi la (re)aliĝon
 - Registris kaj traktis (re)aliĝojn al Espéranto-France, ĉe tiuj (nov)membroj kiuj sendis ĉekon aŭ pagis kontante aŭ per sia bankkarto en la sidejo (Sum Up).
 - Peris la (re)aliĝojn al UEA kaj ILEI por tiuj membroj kiuj volis fari tion pere de Espéranto-France, pro kio ni gajnas iom da mono kiel elcentaĵon.
 - Aranĝis la abonojn al diversaj internaciaj revuoj por tiuj membroj kiuj volis fari tion pere de Espéranto-France, pro kio ni gajnas iom da mono kiel elcentaĵon.
 - Kunlaboris kun la informadiko por doni realajn ekzemplojn de la uzado, danke al kio kaj ĉiu-tagaj prizorgoj far la informadiko, nuntempe nia sistemo Arthur, funkcias tre glate kaj la membroj povas facile aranĝi siajn membrec-aferojn sur Arthur. Vi nepre jam spertis tion laborante en via persona spaco ĉi tie : [https://esperanto-france.org/\(via persona kontnumero ĉe Esp FR\)/](https://esperanto-france.org/(via%20persona%20kontnumero%20ĉe%20Esp%20FR)/)
 - Kunlaboris kun nia retbutiko por trakti aŭtomatajn mendojn. Nia retbutiko multe faciligas nian laboron kaj bone diskonigas nian libroservon. Vi mem povas sperti ĉi tie : <https://butiko-esperanto-france.org/>
 - Helpis la esploristojn por serĉi en nia arkivo pri diversaj materialoj kaj ĉefe pri la sukcesa projekto Péraire (danke al Pascal Dubourg Glatigny kaj Régis Fournier) surbaze de unikaj materialoj de nia arkivo <https://arkivo.esperanto-france.org>
- Ili nuntempe laboras sur alia plano kiun ni esperas esti sukcesa pli-malpli kiel la projekto Péraire. Pri la projekto Péraire vi povas vidi la detalojn ĉi-tie : <https://peraire.huma-num.fr/eo>

Se vi volas viziti nin, trinki kafon kun ni, aĉeti librojn aŭ donaci viajn jam legitajn E-librojn kaj ĉefe personajn hereditajn Esperanto-arkivojn, ni volonte estas je via dispono.

Aktuale la Sidejo estas malfermita al la publiko lunde, marde, merkrede kaj ĵaŭde (tel.: 01 42 78 68 86).

Nia regula skipo surloke konsistas el Maria Fessl, Régis Fournier, Elisabeth Jouhaud kaj Said Baluĉi sed laŭ la bezono helpas nin ankaŭ aliaj homoj.

Kompreneble rete kaj en la sidejo multe helpis nin la aktuala kaj pasinta estraroj, komitatanoj kaj respondeculoj de Informadiko, Retbutiko, Financo, Administrado, sekretaria fako ktp.

Vi estas bonvena dum via vojaĝo al Parizo kaj tra Parizo. Ni plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn kaj respondos al viaj demandoj.

Raportis Said Baluĉi

3.3. Landa kongreso

Ĝi okazis de la 8a-12a de majo 2024, en Strasburgo, kie troviĝas pluraj internaciaj institucioj. Strasburgo estas la ĉefurbo de la Granda Orienta-regiono (Alzaco, Loreno kaj Ĉampanjo). Finfine, tiu kongreso estis ne landa kongreso sed eŭropa kongreso.

La eventon partoprenis 618 geesperantistoj el 35 landoj ne nur el Eŭropo, sed ankaŭ el aliaj kontinentoj. Al la kongreso, krom la ĉeforganizanto, Esperanto-France, aliĝis la Germana E-Asocio (GEA), la Belga E-federacio (BEF), la Svisa E-Asocio (SES), la Itala E-Federacio (IEF), la Internacia Fervojista E-Federacio (IFEFE) kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Ĉeestis kaj la programon pli-riĉigis per siaj intervenoj ankaŭ kelkaj estraranoj de UEA. La loka asocio organizis E-budon ĉe la eŭropa parlamentejo.

La kongresejo troviĝis en la strasburga universitato tute proksime al la urbocentro. Ĉe la alveno, en la vasta halo bonvenigis nin per kanto la famkonata grupo Kajto. Tuj ekestis bona etoso kaj la ĉeestantoj kunkantis. Ne pretervidebla estis kontraŭ-milita ekspozicio instalita tie. Ankaŭ eblis ricevi E-afiŝon por eŭropaj elektoj.

La prezidanto de Esperanto-Francio kaj de la loka kongreskomitato Bruno Flochon inaŭguris kaj salutis la ĉeestantojn de la kongreso. Bonvenigajn vortojn aldonis ĉiuj partneraj asocioj kaj aliaj institucioj. Surekrane salutis la kongresanojn la urbestro Jeanne Barseghian kaj la estraranino de la Rejna Konsilio. La inaŭguro finiĝis per kantado de la Esperanto-himno. Tuj poste ni estis invititaj al aperitivo kun kuglof-kuko. Ridetoj kaj ĝojo regis dum renkonto kun konataj geamikoj kaj koniĝo kun novaj esperantistoj. En angulo estis vendataj kelkaj E-produktoj, biero kun Esperanto-etikedo sur la botelo, veganaĵoj, marmelado kaj aliaj bongustaĵoj. La ĉeestantoj povis ankaŭ admiri filatelan ekspozicion, aĉeti bildkartojn kaj poŝtmarkojn aŭ specialan koverton dank'al Michel Basso. En gazetoj aperis pluraj artikoloj pri la evento.

La temo de la kongreso estis "Dialogo inter eŭropaj popoloj, portanto de paco", kiu estis bone pritraktata dum pluraj okazoj. La programo de la Eŭropa Esperanto-kongreso estis tre varia kaj riĉa. Estis prezentitaj multaj allogaj programeroj kaj prelegoj. Iom simejloj kiel dum la Universalaj Kongresoj estis malfacile elekti, ĉar pluraj okazis samtempe.

Bone funkciis libroservo, E-kursoj, Scienca Universitata Sesio (SUS). Spontane okazis kantateliero kun Kajto, omaĝo al Wilhem Auld kaj Marjorie Boulton, prelegoj kaj preparoj al KER-ekzamenoj, vesperaj koncertoj kaj multnombraj ekskursoj. La famkonata grupo Kajto Ankie kaj Nanne tutan daŭron de la evento animis la programon per siaj kantoj kaj kantigis la ĉeestantojn en pluraj okazoj.

Vespere okazis pluraj koncertoj de konataj kaj malpli konataj esperantistoj, inter kiuj muzikistino el Italio Klarisa. Ŝi ludis harpon kaj kantis en pluraj lingvoj amkantojn, Tim gitaris kaj kantis popularajn kantojn, Inicialoj D. C. uzis en sia programo sinkronizitajn videofilmojn. Jonny M prezentis regenstilan muzikon, Ralph Glomp adaptis kaj komponis muzikon kantante poemojn de Marie Hankel, Gijom'Armid ludis pianon kaj kantis siajn novajn iom utopiecajn verkojn. La muzikan kulturan programon teknike kaj bone prizorgis Floreal Martorel.

En la programo estis proponataj pluraj ekskursoj en la urbo mem aŭ en la ĉirkaŭaĵo de tiu bela alzaca regiono. Dum pluraj lokaj ekskursoj la esperantistoj povis profiti ŝipadon sur kanaloj de Strasburgo kun esperantlingvaj komentarioj, kaj admiri belajn pejzaĝojn. Eblis ankaŭ koni la urbon per turismaj trajnetoj, viziti la katedralon, parlamentejon, muzeojn ktp. Por fervojistoj estis alloga vizito de muzeo en Mulhouse. La postkongreso kondukis al bela urbo Colmar, kie antaŭ sep jaroj okazis IFEF-kongreso. Do, eblis refreŝigi la memorojn pri tiu pitoreska urbo.

Dum la fermo de la kongreso estis projekciataj segmentoj el kongresa etoso por freŝe rememori agrablajn

momentojn. Dum la muzikaj paŭzoj denove prezentiĝis: Tim, Gijom'kaj Kajto. Estis memorigita la unua franc-germana kongreso, kiu okazis en Strasburgo en la jaro 1969. Kelkaj el la partoprenantoj ĉeestis ĝin infanaĝe. Fine oni alvokis sur la podion kelkajn kunlaborantojn kaj dankis kvindek aliajn. Dank'al la bona organizado de la evento ĉiuj ĝuis neforgeseblan kongreson.

Raportis Liba Gabalda

La kompleta programo estas videbla sur la paĝo :<https://kongreso2024.esperanto-france.org/?lang=fr>

3.4. Preleg-turneoj

Post longa paŭzo, denove okazis prelegturneo. Josua MOSS, juna esperantisto (komisiito de Adoleska Agado en TEJO - Fakulo pri Junula Agado en NZEA - Prezidanto de ALEJ), vizitis Eŭropon dum la aŭtuno 2024. Li antaŭe ĉeestis en Roterdamo kaj li partoprenis al la kongreso VSKK en Belgio fine de oktobro.

Li prelegis en Francio inter la 6an kaj la 29an de novembro, plejparte en Okcitanio. Li komence partoprenis al la staĝo en Aruto (eta vilaĝo en Arjeŝo). Li vizitis plurajn lokajn klubojn kaj restis kelkajn tagojn en Tuluzo.

Li poste veturis ĝis la regiono Alzaco, prelegante en Strasburgo kaj Thionville. Li daŭrigis sian vojaĝon en Eŭropo irante al Varsovio.

Li prelegis rilate al du temoj: ĝenerala prezentado de lia lando, aŭ pri la historio de koloniismo kaj ĝiaj nunaj efikoj en Novzelando (alinome Aotearoo).

Raportis Régis Fabre

4. Kunordigado kaj funkciado

4.1. Rilatoj kun UEA

Michael-Boris Mandirola estas komitatano A ĉe UEA por reprezenti Espéranto-France por la periodo de 2022 ĝis 2025.

4.2. Komitato kaj membraro

Jaro 2024–2025

Por la jaro 2024/2025, nova komitato estis elektita en majo 2024 en Strasburgo. La komitato kunvenis kvar fojojn persone en majo 2024, en oktobro 2024, en januaro 2025 kaj kunvenos en junio 2025 en Nantes. La komitato kunvenis dufoje per reto: en marto kaj majo 2025.

Reprezentas la membrojn (2024-2025):

Andréa BERTRAND ★ Raymonde COQUISART ★ Régis FABRE ★ Bruno FLOCHON ★ Clément Genty ★
Xavier GODIVIER ★ Michaël-Boris MANDIROLA ★ Jean-Lucien MAZEAU ★ Sébastien MONTAGNE ★
Marcelle PROVOST ★ Christine RAIFFAUD ★ Bruno ROBINEAU

Estraro (2024-2025)

- | | |
|---|---|
| • Prezidanto: Xavier Godivier | • Prelegvojaĝoj: Régis Fabre |
| • Ĝenerala sekretario: Claire Divoy, poste Marcelle Provost | • Korespondanto pri Esperanto Aktiv: R. Coquisard |
| • Kasisto: Régis Fabre | • Estrarano: Marcelle Provost |
| | • Estrarano: Gilles Tabard |

Reprezentantoj de la membraj asocioj (2023-2024):


- | | |
|--|---|
| • Aŭvernio: Rémi Deneu | 01/2025) |
| • Bretonio: Claude Bensimon | • Orientfrancio: Jean-Luc Thibias |
| • Francilio: Pierre Gauthier | • Provenco: Thierry Spanjaard |
| • Limoĝio: Gilles Tabard | • JEFO (junuloj): Inès Kahin |
| • Norda Francio: Claire Divoy (demisiis en | • GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot |

Membraro:

Estis 618 membroj fino de 2024. Kontraŭ 589 membroj fino de 2023 kaj 616 membroj je la fino de la periodo 2021-2022 (30a de septembro 2022) kaj 612 membroj je la fino de la periodo 2020-2021 (30a de septembro 2021).

La nombro de membroj estas sufiĉe stabila dum la lastaj 12 jaroj sed indas substreki ke tio estas dank'al kreskanta kontribuo de la partneraj lokaj asocioj kiuj aliĝis al la komuna kotizo-sistemo. **Pli ol triono de la membraro venas en 2024 pere la lokaj asocioj en 2024.**

Indas kompreni ke tiu stabileco kaŝas malkreskon de la nombro de individuaj membroj kiuj aliĝis rekte kaj ne pere de loka asocio. Tio montras malkreskon de la franca Esperanto movado, kun malapero de asocioj. Tiel inter la 24 asocioj kiuj aliĝis al la komuna kotizo-sistemo, 9 ne plu aktivas aŭ malaperis.



L'âge moyen est de 66 ans, l'âge médian 70 ans (la moitié des membres ont moins et la moitié plus de 70 ans). On constate une baisse de l'âge moyen par rapport aux années passées : 69 en 2018, 68 en 2020, 67 en 2022. L'apport croissant des associations locales explique ce renouvellement et "rajeunissement".

4.3. Financoj

Vd. la financon raporton: <https://esperanto-france.org/finances/2024>

5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

Neniun raporton ni ricevis

5.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

Agadraporto 2024 de la Federacio Esperanto-Bretonio / Fédération Espéranto-Bretagne

La Federacio Esperanto-Bretonio organizas komunajn agadojn por la lokaj asocioj de Bretonio:

Lokaj grupoj aŭ kontaktoj en

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Lannion, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.
- Finistère: Douarnenez, Morlaix.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo, Pleugueneuc.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu, Couëron.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

Membraro: ĉirkaŭ 100-150. Inter ili estas 63 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj plej multe partoprenas al la komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France (Armor Espéranto, Espéranto-Plouézec kaj Espéranto Rennes).

Agoj de la federacio:

Renkontiĝo en Pluezek dum semajnofino 6-7 aprilo. Vegetara Esperanto Renkontiĝo 13-14 de julio 2024 en la ekologia loko "Terre et Partage" Paimpont, organizita de Nikol Rizzon. Semajnfino en St-Aignan de Grandlieu., 4an – 5an de oktobro 2024.

Eldono de la federacia bulteno Verda Triskelo kun 2 numeroj dum 2024 danke al la teamo de Hélène, Chantal kaj Josette.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/> administrantoj: Bert kaj Xavier.

Reta diskutlisto de la membroj gastigata de Esperanto-France: bretonio@esperanto-france.org kun pli ol 200 abonantoj, administrata de Xavier. La diskutlisto ricevis pli ol 100 mesaĝoj dum 2024.

Retaj kunvenoj de la komitato por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

